


## Three Buddhist Fables:

### Rakonto pri Gekolomboj

Iam antaŭe, paro da kolomboj vivis kune en sia nesto. Kiam beroj maturiĝis en aŭtuno, ili plenigis sian neston per la beroj. Sed poste, la kolektitaj beroj iom post iom malmultiĝis pro sekiĝo, kaj ĝisfine restis nur duono. La virkolombo koleriĝis kaj kulpigis la kolombinon: "Ni kune kolektis la berojn kun granda peno. Kial vi sola manĝis ilin, ke restas nur duono?"



La kolombino respondis: "Mi ne manĝis la berojn. Ili malmultiĝis per si mem." La virkolombo ne kredis tion. Ĝi furioziĝis kaj refutis: "Se vi ne manĝis, kiel la beroj povus malmultiĝi per si mem?" Ĝi do mortigis la kolombinon per sia beko. Ekpluvis post pluraj tagoj. La beroj malsekiĝis, kaj pligrandiĝis ĝis la antaŭa multeco. Vidinte tion, la vira kolombo ekpentis: "Ŝi fakte neniam ŝtele manĝis berojn. Ŝin mi miskulpigis kaj erare mortigis." Ĝi do triste vokadis la kolombinon: "Kien vi iris, mia kara?"

<http://www.budhano.cn/podkasto/?p=119#more-119>

### Mortigi Testudon

Iam knabeto sin amuzis ĉe rivero kaj kaptis grandan testudon. Li volis ĝin mortigi, sed ne sciis kiel agi. Li do demandis al aliulo: "Kiel mi mortigu ĝin?" La viro respondis: "Metu ĝin en akvon kaj dronigu ĝin." La knabo tuj kredis la vortojn. Li metis la testudon en la akvon, sed la testudo forkuris de li senprokraste.



<http://www.budhano.cn/podkasto/?cat=5>

## Feliĉa Homo

lutage en printempo, Wang Liangbin (Ŭan Ljanbin) alvenigis sian servanton.

"Kiom da helikoj vi aĉetis?"

"100 kilogramojn, Sinjoro."

"Ĉu ankaŭ birdojn?"

"Jes, sinjoro, pli ol sesdek."

"Ĉu vi havis sufiĉan monon?"

"Jes, Sinjoro."

Wang neniam elspezis multe por si mem. Li estis ŝparema kaj vivis simple. Li elspezis plejparton de sia mono aĉetante bestojn por liberigi.

Okaze de lia naskiĝtago, liaj lernantoj volis okazigi festenon por li. Kiam li informiĝis pri tio, li proponis al ili: "Se vi volas favori min, uzu la festenan monon por aĉeti bestojn kaj liberigi ilin. Tio estos la plej bona donaco por mia naskiĝtago."

Ĉiuj liaj lernantoj estis emociitaj, kaj ili agis laŭ lia propono.

Tiujare li savis bestojn duoble pli multe ol kutime.

Post kelkaj jaroj, bubalo de lia najbaro estis tro maljuna por labori kaj ĝia mastro decidis vendi ĝin al buĉisto. La bubalo eble sciis, ke venos ĝia fino, ĝi do forkuris de sia mastro kaj rekte iris al Wang Liangbin. Ĝi genuiĝis antaŭ li por peti lian helpon.

Wang kolektis sufiĉan monon, aĉetis ĝin kaj prizorgis ĝin dum ĝia resta vivo.

La infanoj lernas tre rapide de siaj gepatroj eĉ sen instruado. Wang estis ĉiam bonkora al la aliaj, tial liaj infanoj ankaŭ lernis bonkorecon. Wang ĉiam faris sian laboron atenteme, kaj liaj infanoj ankaŭ faris la siajn atenteme. Ili obeis al siaj gepatroj kaj lernis tre diligente. Poste ili gajnis altan pozicion en la kortego kun grandaj gloro kaj honoro al la tuta familio.

Wang Liangbin havis longan, pacan kaj feliĉan vivon. Li forpasis sen ajna doloro aŭ malkomforto. Post la morto li aspektis ankoraŭ tiel paca kaj kvieta, kiel meditanta bonzo.



<http://www.budhano.cn/pod/vivoj/092.mp3>

(Modifisto : Arris)